ISSN 2072-5825

# Espero Katolika




Numero 4-6/2020

Aprilo-Junio 2020

**Sur la kovrilo:** La Katolika Instituto en Parizo, en kiu estis en la jaro 1910 fondita IKUE.

## ENHAVO


| | |
|---|---|
| 1910 - CENT DEK-JARIĜO DE IKUE – 2010 - EL HISTORIO DE IKUE | 19 |
| ANTAŬ 150 JAROJ NASKIĜIS PASTRO EMILE PELTIER - LA FONDINTO DE „ESPERO KATOLIKA“ | 22 |
| ĈU ADIAŬ AL CELIBATO? | 23 |
| LA PREĜEJOJ ESTAS BRULIGATAJ, PRIRABATAJ KAJ PROFANATAJ | 24 |
| DUM 10 MONATOJ BRULIĜIS EN FRANCIO 11 KRISTANAJ SANKTEJOJ | 25 |
| OPEN DOORS: ĈIU OKA KRISTANO ESTAS PERSEKUTATA | 26 |
| MALFERMU NIAJN OKULOJN | 27 |
| KIEL ŜANĜIĜIS VALOROJ DE LA VIVO | 28 |
| ABC CIVILIZACIO DE LA AMO - KARDINALO STEFAN WYSZYŃSKI | 29 |
| KIAL MI DEVUS VIZITADI PREĜEJON? | 29 |
| MIA „PATRO NIA” - FRANCSICS JÓZSEFNÉ (HUNGARIO) | 30 |
| TIO ESTAS MI, NE TIMU (MAT 14,27) - EŬKARISTIA MEDITO DE BEATA CONCHITA ARMIDA | 31 |
| KRISTO EL MORT´ LEVIĜIS - KANTO | 32 |



**Centra Oficejo de IKUE: Via di Porta Fabbrica 15, I-00165 ROMA RM, Italio**

**Elektronika poŝto:** <ikue@ikue.org>

**TTT-paĝoj:** http://www.ikue.org - http://www.esperokatolika.org * **Dissendolisto:** <ikue@yahoogroups.com>

**UEA-konto "ikue-v"** * **Banko:** "Unione internazionale cattolica esperantista" Roma, Italio

IBAN IT34H0760103200000023290000 - BIC/SWIFT: BPPIITRRXXX

*Registriĝo ĉe la tribunalo de Romo* - Registrazione presso il Tribunale di Roma

n. 17138, 11-2-1978

Gratis agli Associati

*Presejo* - Tipografia

ROTASTAMPA s.a.s. - Via G. Mirri 21, 00159 ROMA RM, tel. +39-06.43.80.051

*Respondeca Direktoro* - Direttore responsabile

Antonio DE SALVO, Via Aldebaran 13, Parco Azzurro, I-00010 GUIDONIA RM, Italio

tel. (vespere) +39-07.74.36.36.03 E-poŝto: <antoniodesalvo@tiscali.it>

**Espero Katolika**, revuo fondita en 1903, estas oficiala organo de **I.K.U.E.**
**INTERNACIA KATOLIKA UNUIĜO ESPERANTISTA** internacia asocio de fideluloj fondita en 1910, agnoskita laŭ pontifika juro per Dekreto n. 196/92/S-61/B-25 de 11.2.1992 de la PAPA KONSILIO POR LAIKOJ. **Spirita Konsilanto:** frato Pierluigi Svaldi - **Prezidantino:** Marija Belošević - **Vic-Prezidanto:** Miloslav Šváček - **Vic-Prezidanto:** Pavol Petrík - **Ĝenerala Sekretario/ Kasisto, direktoro de la C.O.:** Carlo Sarandrea - **Kontorevizoroj:** Norma Cescotti Covelli,Tiziana Fossati, Krzysztof Tomczak.

# 1910 - CENT DEK-JARIĜO DE IKUE – 2010
## El historio de IKUE

***En la nuna jaro Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE) solenas sian cent dekan datrevenon de la fondo de IKUE, okazintan la 1-an de aprilo 1910 en Parizo. Por rememori tiun ĉi gravan eventon de IKUE, ni koncize konatigu nin kun ĝia historio, malgraŭ tio, ke koncize skizi historion de IKUE, kiu travivis diversajn periodojn de sia ekzistado, ne estas facila tasko.***

Se ni retrorigardas pli ol cent tridek jarojn malantaŭen, ni povas konstati, ke la kristanan Esperanto-movadon jam komencis la kreinto de Esperanto D-ro Ludoviko Lazaro Zamenhof (1859-1917) mem, kvankam li ne estis kristano, sed de hebrea konfesio, ĉar jam en kelkobla eldono de sia Lernolibro ekde la jaro 1887 li publikigadis preĝon Patro nia en propra traduko. Li opiniis ĝin kiel unu el la plej kulturaj valoraĵoj de la homaro.

Preskaŭ samtempe komencis sian agadon surkampe de Esperanto litova pastro en Vilno Aleksandras Dambrauskas (1860-1938), kiu verkis kelkajn religiajn kantojn en Esperanto, kiujn oni kantis unuafoje dum Diservo en Smolensk la 26-an de decembro 1896. Pastro Dambrauskas ofte vigle diskutis kun kreinto de Esperanto Zamenhof pri lingvaj kaj religiaj movadoj. Li estis la unua korespondanto de D-ro Zamenhof en Esperanto.


*Sac. A. Dambrauskas*

En la jaro 1902 franca pastro Emile Peltier (1870-1909) komencis eldonadi esperantlingvan apendicon de franclingva revuo „L´Aube“, kaj oktobre de la jaro 1903 li komencis eldonadi revuon „Espero Katolika“ kiel organon de organizaĵo „Societo Espero Katolika“, kies nomo pli poste en la jaro 1910 estis ŝanĝita je ĝis nun ekzistanta Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE). La revuo Espero Katolika (EK) estis aprobita fare de loka ĉefepiskopo de Tours en Francio, René François. Poste ankaŭ pluaj episkopoj donis aprobon al presado de la esperantlingvaj tekstoj. Pastro Emile Peltier indikis la celon de la revuo EK per la difino: «Espero Katolika ne intencas esti lingva, sed literatura revuo kaj internacia ligilo inter la katolikoj». La devizo de EK estis latinlingve «Unum ovile et unus pastor» - esperantlingve «Unu ŝafejo kaj unu paŝtisto». Sur la unua paĝo de la nova revuo estis poemo, verkita de prelato Aleksandro Dombrowski dediĉita al Papo Pio la 10-a:


*Sac. Emile Peltier*

**Al Lia plej Sankta Moŝto Papo Pio X-a**

Ĉesis jam viva malgajo publika,
Dio ĝojigis la Kristeklezion:
Sur trono Petra la mond’ katolika
salutas Pion.

Grincu per dentoj infera serpento!
Nin ne timigas jam via envio:
Tra l’ maraj ondoj kaj forta vento
nin gvidas Pio!...

Oni diradu, ke Petra la Ŝtono
jam detruiĝas, fariĝas nenio…
Granda mensogo! Jen sankta la trono
kaj sur ĝi Pio!...

Tial laboru sen tim’ kristanaro
ĝis kiam estos, laŭ vorto de Dio:
Unu paŝtisto kaj unu ŝafaro…
Vidu ĝin Pio!

En la Unua Universala Kongreso de Esperanto en la jaro 1905 en Boulogne sur Mer en Francio prezentis la kreinto de Esperanto sian faman preĝon „Preĝo sub verda standardo“ kaj la pastro Peltier elparolis jenan alvokon:

«Karaj gefratoj, la koroj de ĉiuj tie ĉi estas plenaj je frataj sentoj. Sed ĝis nun oni parolas nur pri la frateco inter diversnacianoj. Mi esprimas la deziron, ke per Esperanto ankaŭ fratiĝu la diversreligianoj; ke ĉiuj pastroj, katolikaj aŭ protestantaj, hebreaj aŭ rusortodoksaj, per Esperanto unuiĝu por kune labori al la universala frateco. Mi povas certigi, ke Espero Katolika ĉiam klopodos atingi tiun celon».

Ekde tiu momento ni povas paroli pri ekumenismo inter esperantistoj, kaj precipe en la katolika Esperanto-movado.


Mons. Luigi Giambene

La 2-an de junio 1906 papo Pio la Deka perbuŝe aprobis kaj benis la agadon de la katolikaj esperantistoj. Tiam la papo en interparolo kun Monsinjoro prof. Luigi Giambene, prelato kaj sekretario de la Roma Esperantista Grupo «Imperiosa Civitas», kiu transdonis al li la unuajn jarkolektojn de Espero Katolika onidire diris, ke „Esperanto havas antaŭ si grandan estontecon“. La 17-an de junio 1906 la Sankta Patro skribe sin esprimis pri la revuo Espero Katolika. La 28-an de aŭgusto 1906 pastro Peltier ricevis el Vatikano kopion de itallingva letero, kies originalo estis adresita al Mons. Giambene, kaj kiu tekstis jene: «Mi ricevis la honoran komision sciigi al vi, ke la Sankta Patro favoranime kaj kun speciala plaĉo bonvolis akcepti la aperintajn numerojn de la revuo “Espero Katolika”, kiun vi humile prezentis al li je la nomo de Pastro Emile Peltier. Bonvolu, tre respektinda Monsinjora Moŝto, konigi al la nomita pastro la papan plaĉon, kiun Lia Sankta Moŝto donis al li kaj al la redaktoroj de la revuo». La vatikanan leteron subskribis Mons. Giovanni Bressan.


*La 1-a IKUE-prezidanto P. Austin Richardson, Belgio*

La komencaj jaroj ne estis facilaj por EK. Progreso de kritika sanstato de pastro Peltier devigis lin rezigni pri redaktado de EK. Por certigi pluan eldonon kaj prizorgon de EK estis formita komitato kun la membroj: Sac. Austin Richardson (direkcio), kiu transportis la administracion kaj redakcion de EK al Parizo, Claudius Colas (ĉefredaktoro) kaj Mons. Dombrovski (Dambrauskas ĉefa kunlaboranto). La nova komitato emfaze deklaris, ke Sac. Peltier «havis la meriton esti el la unuaj, kiuj komprenis la gravecon de Esperanto por la bono de la homaro kaj de la religio. La mondo katolika komprenos, en la estonteco, lian grandan meriton, kaj lin konsideros kiel apostolon».

Lastan fojon, komence de la jaro 1909, la fondinto de EK pilgrimis al Lourdes, petante al Maria: «... aŭ resanigi lin aŭ doni al li la gracon morti ĉe la sanktejo...» Estis la lasta graco donita al li. Sacerdoto Emile Peltier efektive mortis en Lourdes, la 16-an de februaro 1909, kie li estas entombigita.

La 1-an de aprilo 1910 okazis en Parizo la unua Katolika Esperanto-Kongreso, kiun partoprenis 600 personoj. Kadre de ĝi estis fondita Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista, kies unua prezidanto iĝis abato Austin Richardson el Bruselo. Bedaŭrinde baldaŭ ekestis malfacilaĵoj pro la malbona sanstato de Richardson. La 19-an de aŭgusto 1913 li mortis subite en la aĝo de 70 jaroj.

Dum la 4-a IKUE-Kongreso en Romo en la jaro 1913 estis elektita nova prezidanto sac. J. Patrick Parker el Kilmyshall-Fers-

Cowerfeld (Irlando). EK sub redaktado de redaktoro Smulders aperis regule ĉiumonate dum lastaj du jaroj, io, kio ĝis tiam, neniam okazis.

La jaro 1914 estis tragika jaro, ĉar en ĝi eksplodis la 1-an de aŭgusto la unua mondmilito, kiu daŭris ĝis la 11-a de novembro 1918. Estis tio tragedio ankaŭ por la tuta esperantista movado tute malpermesita en la landoj, kiuj estis okupitaj de fremdaj armeoj. La planita IKUE-kongreso en Lourdes (Francio) ne okazis, la agadoj interrompiĝis, kaj ankaŭ EK ĉesis aperi.


Post kvinjara interrompo, en januaro-februaro 1920, EK ree aperis, provizore eldonita en Aŭstrio.

La katolikaj esperantistoj ekde komenco de sia aktivado konsideris la feston de la Sankta Spirito ankaŭ kiel feston de la esperantistoj, ĉar en pentekosta tago la Sankta Spirito pridonacis la apostolojn per kapablo interkompreniĝi kun ĉiuj. En la jaro 1913 en la 4-a Kongreso de IKUE en Romo estis IKUE konsekrita al la Virgulino Maria – Nia Sinjorino de la Espero.

Dum sekvaj jardekoj ankaŭ pluaj papoj esprimis simpation al celadoj de la Esperanta movado. Karmemora papo la sankta Johano Paŭlo la Dua, ankoraŭ kiel metropolito de Krakovo transprenis en la jaro 1977 aŭspicion super la 37-a Kongreso de IKUE okazinta en fama pilgrimloko Sankta Monto en Częstochowa en Pollando. Sur la sama loko li dufoje alparolis esperantlingve antaŭ miliona amasiĝo de junularo el la tuta mondo en septembro 1991.

Ĉielaj patronoj de la katolikaj esperantistoj krom la Virgulino Maria – Nia Sinjorino de la Espero estas ankaŭ Sankta Patro Pio la Deka, du martiroj de naziismaj koncentrejoj, sacerdotoj – sankta Maksmiliano Maria Kolbe, martirigita en la jaro 1941 en Oświęcim (Auschwitz), uzinta ankaŭ Esperanton en de li eldonata revuo Kavaliro de la Senmakula, kaj esperantisto beata Tito Brandsma, martirigita en la jaro 1942 en Dachau kaj la sankta Johano Paŭlo la Dua.

Tre gravaj eventoj estis oficiala agnosko de Esperanto kiel liturgia lingvo fare de Kongregacio pri la Dia Kulto kaj la Disciplino de la Sakramentoj la 8-an de novembro 1990 kaj oficiala agnosko de IKUE kiel laika eklezia organizaĵo fare de Papa Konsilio por Laikoj la 11-an de ferbruaro 1992. Estis eldonitaj esperantlingva Meslibro kaj Legaĵaro uzataj dum sanktaj mesoj okaze de diversaj internaciaj aranĝoj de la esperantistoj.




*La kovrilo de la unua jarkolekto de EK prezentita al la papo Pio la Deka*

Ekde la jaro 1994 envicigis Sankta Patro Johano Paŭlo la Dua inter kristnaskajn kaj paskajn salutojn „Urbi et orbi“ en diversaj lingvoj ankaŭ Esperanton. La Sankta Patro Benedikto la Deksesa plu daŭrigis en tiu tradicio.

Ekde januaro 1977 Vatikana Radio regule elsendas ankaŭ en Esperanto, komence unufoje en la semajno, ekde la jaro 1981 dufoje kaj ekde la jaro 1998 trifoje en la semajno – dimanĉe, merkrede kaj ĵaŭde (interrete: www.radio-vatikana-esperanto.org/.)

Nunjare do IKUE solenas cent dekan datrevenon de sia fondiĝo okazintan en la jaro 1910 en Parizo. ■

## Antaŭ 150 jaroj naskiĝis Pastro EMILE PELTIER, la fondinto de „Espero Katolika“

Pastro Emile Peltier naskiĝis la 17-an de septembro 1870 en Villandry apud Tours, Francujo. Jam ekde sia infaneco li montris kortuŝan piecon. Li eniris 14-jara en Tours‘an semina-rion kaj en la jaro 1893 li pastriĝis. En seminario de Tours li instruis anglan lingvon, poste li fariĝis paroĥestro en urbeto Sainte Radegounde (Indre et Loire).

Estante fervora lingvisto, tuj kiam Esperanto disvastiĝis en Francujo, P. Emile Peltier komencis lerni ĝin. Senlace li laboris por konvinki la katolikojn pri la utileco de Esperanto por la disvastigado de la sankta religio.



*Pastro Emile Peltier*

Jam en la jaro 1903 aperis esperantlingva aldono al „L‘aube“, franca revueto, sub nomo de societo „Espero Katolika“. La unua n-ro enhavis regularon de tiu ĉi societo, por kiu li ricevis eklezian aprobon de ĉefepiskopo de Tours René Francois. En oktobro 1903 P. Peltier fondis 8-paĝan gazeton „Espero Katolika“.

Dum la I-a Universala Kongreso de Esperanto en Boulogne sur-Mer celebris P. Peltier celebris sanktan meson por esperantistoj; esperant-lingva prediko ne estis ankoraŭ permesita. Dum la II-a universala kongreso de Esperanto en Ĝenevo li ricevis pere de Monsinjoro Giambene leteron el Romo, kiu komunikis al li „specialan plaĉon de Sankta Patro Pio X. kaj lian apostolan benon“. Tuj li ricevis permeson prediki: la unuan predikon en Esperanto faris P. E. Peltier la 2-an de septembro 1906, dum sankta meso en la preĝejo de s-ta Francisko. La granda intereso, kiun havis por Esperanto Sankta Patro Pio X-a, estis la plej granda kuraĝigo por P. Peltier. Dum la jaro 1908, sentante la proksimiĝantan morton, li transdonis la revuon „Espero Katolika“ al redakcia komitato. P. Emile Peltier mortis la 17-an de februaro 1909 en Lourdes, kie li estis laŭ sia deziro enterigita.



*Papo sankta Pio la Deka*

Lia plej bona amiko Claudius Colas skribis pri li: „Pastro Peltier havas la meriton esti inter la unuaj, kiuj ekkomprenis la gravecon de Esperanto por la bono de homaro kaj la religio. Li batalis por ĝia sukceso kun fido kaj kuraĝo ĝis la momento, kiam liaj korpaj fortoj estis ruinigitaj. Nur en la estonteco ekkomprenos la katolika mondo liajn grandajn meritojn kaj ĝi nomos lin apostolo. Imitante lian ekzemplon, ni daŭrigu en nobla agado, kiun li komencis tiel kuraĝe por la gloro de Dio kaj bono de la homaro!“ ■

*Transprenita el INFORMILO de Ligo de katolikaj esperantistoj en Ĉehoslovakujo, 1934.*

„La sankta meso estas la plej sankteca religia faro, kiu plej multe glorigas Dion kaj plej multe prosperas al nia animo. Ni el ĝi akiras forton, por ke ni amu Dion kaj proksimulon kaj ke ni kapablu pardonadi.“

*s-ta Petro Juliano Eymard*

# ĈU ADIAŬ AL CELIBATO?

Pri edziĝintaj pastroj oni diskutas eble jam kvin jarcentojn. La ofica sacerdoteco, sed ankaŭ la geedzeco estis kune atakitaj fare de la plej granda revoluciulo de la dua jarmilo, fare de Marteno Lutero, kiu proklamis, ke nek la unua, nek la dua estas sakramentoj. Li tiel negis gracon de la geedzeca kaj la sacerdoteca statoj. Sed se temas pri la ofica sacerdoteco, estas necese aldiri, ke Lutero ne postulis nur tion, ke ĝiaj portantoj estu edziĝintaj, sed li ĝin kontestas kiel tian sub la preteksto de laŭdira egaleco de la kredantoj antaŭ Dio. Tiel same li kontestas hierarĥion, do la episkopojn frunte kun la anstataŭanto de Petro kaj ilia instruofico.

Hodiaŭ oni parolas pri ĉesigo de la ofica sacerdoteco. Oni konsideras ĝian akomodon al postuloj de la moderna vivo. Oni parolas pri ebligo al la edziĝintaj viroj akcepti la sacerdotan konsekron. Pri tio Lutero ne parolis, sed li celis la ordenajn votojn. Li mem estis monaĥo, aŭgustenano, kiu ne nur nuligis sian ordenan apartenecon, sed li komencis proklami, ke la ordenaj votoj mem estas senmorala abomeno.

Lutero kaj kune kun li la moderna mondo relativigas homon, kreitan laŭ la bildo kaj similo de Dio, kaj tiel estas al la homo forneata kapablo de elekto de la tutviva decido, do fari dumvivan elekton kun absoluta kaj daŭra valideco. Fari decidon, kiu kun helpo de la sanktiga graco, ebligas la sanktan vivon. Preskaŭ la tuta eŭropa socio estis per tiu ĉi luterana revolucio sinsekve ekzaltita kaj misfunkcianta. Kaj en Germanio tiam komencas fari al si vojon propono nuligi la sacerdotan celibaton. Kial? Ĉar mankas sacerdotoj kaj multaj el ili vivas konkubece. Tial tiama katolika imperiestro Ferdinando la Unua eĉ lia filo Maksimiliano la Dua proponas solvon de la sana racio, do sanigi situacion de la konkubecemaj pastroj kaj nuligi la eklezian celibaton: „al la edziĝintaj pastroj estu donita dispenso kaj estu eldonita permeso, por ke en malriĉaj regionoj povu akcepti sacerdotecon ankaŭ edziĝintaj viroj“ – kiel pri tio raportas konata historiisto de la papeco Ludwig von Pastor (1854-1928).

Spite de la ekstreme penega tempo kaj bezono konservi bonajn rilatojn kun imperiismo estis sinteno de Romo klara. La papo estas kompetenta okupiĝi pri la tuta mondo kaj „ne nur pri Germanio. Li do ne povas strebante helpi al unu lando fari gravan vundon al la tuta eklezia korpo“. Kompreneble, ke „se tion oni permesus por Germanio“, tiu ĉi novaĵo senpere disvastiĝus eĉ en la ceterajn katolikajn naciojn. Kaj fine: „permesi geedzecon al sacerdotoj estus decido ekstreme erariga, ĉar tiel en la strebo helpi al la religio estus uzita maltaŭga rimedo, kiu estas koncedo al voluptemo.“

Inter la pasinteco kaj hodiaŭo ekzistas multaj similecoj. Komence per gvidrolo de Germanio, la imperiestra nacio, kiu sin armas en reformacian rolon, kaj tion per montrado al la sama konkreta evidento, kia estas manko de pastroj. Ununura diferenco indanta mencion estas fakto, ke hodiaŭ la reformaciajn dancetojn startigas iuj katolikaj episkopoj kaj ne la ŝtatestroj.

Dumtempe pri la nuligo de la celibato komencis okupiĝi ne nur imperiestroj de la dek sepa jarcento, kiuj almenaŭ sin anoncadis al la katolika kredo. Ja eĉ jakobenoj kaj komunistoj en siaj revolucioj zorgis ankaŭ pri la eblo, ke la pastroj t.n. „povu edziĝi“. Dividu kaj regu! La milito kontraŭ kristanismo estas farata laŭcele. Komprenebla estas la fakto, ke la sacerdoto, devanta zorgi pri la edzino kaj infanoj, estas pli facile ĉantaĝiganta kaj regebla ol celibatulo, kiu familion ne havas. Resume eblas diri, ke pri la edziĝintaj pastroj unuaflanke klopodas kristanoj, kiuj marĉandas pri la sankteco de la kristana stato, kaj duaflanke ankaŭ tiuj plej grandaj malamikoj de la katolika kredo. ■

*La artikolo de la itala historiistino Angela Pellicciari el taggazeto Il Foglio, 23.01.2020. Vatican News, laŭ teksto de Milan Glaser*

# LA PREĜEJOJ ESTAS BRULIGATAJ, PRIRABATAJ KAJ PROFANATAJ

La incendio de la pariza katedralo Notre-Dame la 15-an de aprilo 2019 atentigis pri la realeco, kiu ĝis tiam inter la publiko grandparte ne estis diskonigata: incendioj de la preĝejoj estas en Francio lastatempe oftaj – kaj ne temas nur pri malfeliĉaj hazardaj eventoj, sed pri faroj de brulkrimuloj. Tamen la bruligo de la preĝejoj estas nur unu el multaj manieroj de detruadoj kaj profanadoj de la francaj preĝejoj.

### 1063 kazoj dum la jaro, 3 kazoj tage

La Vatikana Radio mallonge post la incendio de la katedralo Notre-Dame en Parizo publikigis raporton pri la vasta kaj intenca detruado de la katolikaj preĝejoj en Francio.

Kun referenco al la itala katolika gazeto Avennire kaj al la raporto publikigita fare de la franca ministerio de internaj aferoj ĝi atentigis, ke en la jaro 2018 estis dokumentitaj entute 1063 kazoj de atakoj kontraŭ kristanaj sakralaj lokoj, tio estas tri incidentoj ĉiutage. Temis pri la faroj de profanado, neniigado, intence faritaj bruligoj ktp. La raporto de la ministerio de la internaj aferoj, kiun citis la Vatikana Radio, emfazis, „ke krimfarintoj de tiuj ĉi agoj plejofte estas elradikigita junularo, sed ne nur el medio de neintegrigitaj almigrintoj.“ Kiu parto de tio apartenas al tiuj „neintegrigitaj almigrintoj“ la raporto de la ministerio ne specifas...

### Brulantaj preĝejoj, profanitaj sanktejoj...

La gazetara proparolanto de la Franca Episkopara Konferenco Mons. Olivier Ribadeau Dumas komentis situacion per konciza sciigo: „La preĝejoj estas bruligataj, detruataj kaj profanataj. Neniam ni alkutimiĝos al tio, ke tiuj pacaj lokoj estu oferlase donitaj al perfortecoj, kaj al tio, ke estas piedpremata Korpo de Kristo.“ La vatikana Radio informas, ke en Francio temas pri pli longedaŭra problemo kaj ke jam en la jaro 2017 estis registritaj 1038 kazoj de la kontraŭkristanisma detruemo kaj profanado kontraŭ preĝejoj kaj aliaj kristanaj objektoj (tombejoj), ofte ripetfoje. Al tio la Vatikana Radio aldonas: „Tio do estas la kunteksto, en kiu okazis la brulego de la katedralo Notre-Dame. En Parizo estis nur kelkajn tagojn antaŭe farita brulkrima atako kontraŭ sanktejo Saint-Sulpice.“ La incendio en la pariza sanktejo Saint-Sulpice, kiu situas unu kilometron de la katedralo Notre-Dame, estis la 17-an de marto 2019 pruveble intence kaŭzita.

### Demandosignoj ĉirkaŭ la incendio de la katedralo Notre-Dame

Eĉ se la oficiala sciigo prezentis ankoraŭ dum la brulego de la katedralo Notre-Dame (do ankoraŭ pli frue, ol povis komenci esplorado), ke ne temis pri intenca faro, super la tuta evento ŝvebas vico da demandosignoj. La Vatikana Radio citas la francan ĝeneralan eksinspektiston de la historiaj memorindaĵoj Benjamin Mouton, kiu en la jaro 2010 inspektis instalon de kontraŭincendiaj sistemoj en la pariza katedralo: „Dum kvardek jaroj mi neniam aŭdis pri tia incendio. Estus necese uzi vere multan kvanton da brulivaĵoj, por ke la brulego sin povu disvastigi tiel, kiel ni tion vidis. La kverka ligno estas do maksimume brulrezista. En la tuta konstruaĵo de la katedralo ekzistas nur minimumo da elektroaparatoj, kaj el la plafonoj ni la elektran instalon tute forigis en la jaro 2010.“ ■

*Fonto: revuo „Milujte se“ 2019-50*




**Dum 10 monatoj bruldetruiĝis en Francio 11 kristanaj sanktejoj, do ne nur Notre-Dame de Parizo:**

Notre-Dame de Grâce d'Eyguières - la 21-an de aprilo 2019
Notre Dame de Parizo - la 15-an de aprilo 2019
Saint Sulpice de Parizo - en marto 2019
Katedralo St. Alain de Lavaur - en februaro 2019
Saint Jacques de Grenoble - en januaro 2019
Sanktejo de Sacré Coeur de Angoulême - en januaro 2019
Saint Jean de Bruel - en oktobro 2018
Sanktejo de Villeneuve-d'Amont - en aŭgusto 2018
St. Thérèse de Rennes - en julio 2018
Saint Paul Church de Bas Caraquet - en junio 2018
Notre-Dame de Grace de Revel - en julio 2018

# Open Doors: ĈIU OKA KRISTANO ESTAS PERSEKUTATA

260 milionoj da kristanoj en la jaro 2019 estis eldonitaj al premo aŭ perforto pro la kredo. Raportas pri tio en sia jarraporto evangeliana neregistara organizaĵo Open Doors.

En la mondo nuntempe vivas ĉirkaŭ du miliardoj da kristanoj. El la raporto de la organizaĵo agadanta en 70 landoj evidentiĝas, ke ĉiu oka kristano spertis persekuton pro sia kredo. Kompare al 245 milionoj en la jaro 2018 la raporto por la jaro 2019 mencias je 15 milionoj de la persekutitoj pli multe. La alkresko ligiĝas kun tendencoj en kelkaj grandaj landoj kiel estas Hindio kaj Ĉinio kaj kun ĝihadismo en subsahara Afriko, kiu nuntempe dissemas plej multe da viktimoj, sciigas direktoro de la itala sekcio de Open Doors Cristian Nani:



*Caravaggio: Krucumo de sankta Petro*

„La tuta subsahara teritorio estas malstabiligita. Ĝihadismo disvastiĝas, oni povas distingi eble 27 radikalajn islamismajn grupojn, al iliaj celoj apartenas elimino de la kristanoj. Mi mencias unu ekzemplon: ili alveturos al vilaĝo en norda BurkinaFaso proklamante tritagan ultimaton, dum kiu la kristanaj familion havas eblon foriri. Se ili ne obeas, ili estas murditaj.“

Open Doors kalkulas 11 ŝtatojn, en kiuj okazas „ekstrema persekutado“. Jam ekde la jaro 1993 ĝi ellaboras kalkulojn surbaze de informoj pri la religia libereco en privata eĉ publika sferoj (ĝi estas observema al eblo preĝi kaj legi Biblion, ligi interkonfesiajn geedzecojn, konvertiĝi al alia kredo, sed ankaŭ al plenumo de la ordono de preskribita vesto, labordiskriminacio, respektado de la homaj rajtoj, kontrolo de civitanoj kaj detruoj de preĝejoj) kaj sistemigas informojn pri viktimoj de la religie motivigita perforto farita al kristanoj (murdoj, seksaj perfortoj, prizonado sen juĝproceso, agreso, seksa misuzado).

Frunte de la malĝoja klasifiko jam ekde la jaro 2002 estas Norda Koreio. Open Doors supozas, ke 300 mil kristanoj en tiu lando vivas sub minaco de mortkondamno aŭ de devigaj laboroj, se evidentiĝus ilia kredo. Sekvas Afganistano, Somalio, Libio, Pakistano, Eritreo, Sudano, Jemeno, Irano, Hindio kaj Sirio.

„En teritorioj de la konflikto en Proksima Oriento ni devas konstati fakton de ekstermo de la kristanaj komunumoj. En la jaro 2003 vivis en Irako 1,5 milionoj da kristanoj. Hodiaŭ oni parolas pri 202 miloj, t.s. 87 procentan malkreskon. Okazas sinsekva eliminado de la kristana ĉeesto, parazitata per persekutado, kiu igas la kristanajn komunumojn tre vundeblaj. Se do en la regiono okazas konfliktoj inter diversaj frakcioj de islamo, estas ankaŭ vero, ke unu aferon ili havas komunan: ili koincidas pri tio, ke la kristanoj malaperu el tiu ĉi teritorio. Simile el Sirio malaperis ekde la komenco de la civitana milito 66 % da kristanoj.“

Laŭ raporto de Open Doors estis en la

jaro 2018 mortigitaj pro la kredo 2983 kristanoj. Kompare al la antaŭa jaro ilia nombro malgrandiĝis danke al pli malgranda nombro da murdoj en Niĝerio, kvankam tiu ĉi lando konstante okupas la unuan lokon (1350),



sekvas ĝin Centrafrika Respubliko (924) kaj Sri-Lanko (200), kie okazis aprile 2019 terorisma atako kontraŭ tri preĝejoj. La raporto mencias, ke la informoj estas subtaksitaj, ĉar multajn kazojn la amaskomunikiloj prisilentas kaj la publiko ankaŭ ne ricevas informojn pri la mortoj kaŭzitaj pro longtempa diskriminacio, kiel ekzemple manko de trinkebla akvo aŭ la medicina zorgo.

Nove en la listo de 50 landoj, en kiuj kristanoj havas malfacilan vivon, aperas lige kun atencoj fare de teroristoj de Boko Haram Kamerunio kaj Niĝerio, BurkinaFaso, kie ankaŭ disvastiĝas la islamisma terorismo. En la unuan dekon viciĝis deno-ve Hindio, kie estas la kristana minoritato opiniata kiel minaco por nacia identeco. Ekzemple en ŝtato Himaĉalpradeŝ en la norda landparto estis aŭguste de la jaro 2019 pliseverigita leĝo kontraŭ konvertoj, punanta kian ajn instigon al ŝanĝo de religio per 5-jara malliberigo.

Al pli alta ŝtupo koncerne la persekutadon suriris ankaŭ Ĉinio, kie vivas ĉirkaŭ 90 milionoj da kristanoj. La raporto Open Doors parolas pri detruo de pli ol 5,5 miloj da preĝejoj (5576) nur dum la jaro 2019 kaj ĝi atentigas pri ĉiam pli rafinita limigado de la religia libereco dum uzado de biometriaj teknologioj kaj de la artefarita inteligenteco.

Dum preskonfereco donis Open Doors ankaŭ raporton pri la perforto farita al kristanaj virinoj:

„Ni konsciiĝas, ke ne pri ĉio ni estas perfekte informitaj, malgraŭ tio ni arigis 8 kaj duono de miloj da kazoj de la seksa perforto celita kontraŭ kristanaj virinoj. Temas pri



*Asia Bibi*

la virinoj, kiuj estis forkaptitaj, sekse perfortitaj kaj bedaŭrinde iam eĉ murditaj. Sed ni scias, ke tio estas nur pinto de la glacimonto. Ekzistas ankaŭ la tuta vico da devigaj geedziĝoj, kiujn ni dume ne havas eblon bone observi,“ diras por la Vatikana Radio Cristian Nani, direktoro de la itala sekcio de Open Doors. ■

*VaticanNews, 16.01.2020*


## MALFERMU NIAJN OKULOJN

Malfermu niajn okulojn, Sinjoro, por ke ni povu vidi Vin en niaj gefratoj.
Malfermu niajn orelojn, Sinjoro, por ke ni povu aŭdi la vokojn de tiuj, kiuj havas malsaton, malvarmon, timon, kaj estas subpremataj.
Malfermu nian koron, Sinjoro, por ke ni lernu ami nin reciproke samkiel Vi amas nin.
Donacu al ni denove vian Spiriton, Sinjoro, por ke ni fariĝu ununura koro kaj ununura animo, en via nomo. Amen.

*Patrino Tereza*

# KIEL ŜANĜIĜIS VALOROJ DE LA VIVO

La valorsistema mondo dum tutaj generacioj konis tielnomatan sepon de la ĉefaj pekoj: fiereco, avareco, malmodereco, envio, kolero, malĉasteco, maldiligenteco[1].



*Sac. D-ro Max Kašparů*

**Ĉu la ĉefaj pekoj ŝanĝiĝis je preferoj?**

Dumtempe ilia enhavo ŝanĝiĝis ĝis la nuntempa formo:
- la fiereco iĝis sana memfido;
- la avareco iĝis regulo de ekonomio;
- la malmodereco estis altigita al pli granda vivnivelo;
- la envio ŝanĝiĝis je batalo por justeco;
- la kolero ŝanĝiĝis je la sana reago rilate al nekorekta agado de aliuloj;
- la malĉasteco ŝanĝiĝis je prevento kontraŭ neŭrozoj;
- la maldiligenteco ŝanĝiĝis je precizesprima kaj ĥronika tendenco prokrasti devojn kaj taskojn al pli malfrua tempo.

**Kaj tial fakte jam ne plu ekzistas pekuloj...**


Danke al tiu ĉi moderna nomenklaturo senigis sin la malnova kontinento de gravaj pekuloj. Se ni al tio alkalkulos ankoraŭ aliajn, hodiaŭ jam nemulte konatajn, preskaŭ arĥaikajn nociojn kiel:
- la malĝentileco, kiu ŝanĝiĝis je libereco de opiniesprimado,
- la priŝtelado ŝanĝiĝis je difinita libera merkato,
- la malzorgata edukado de infanoj ŝanĝiĝis je kreo de la propra koncepto de la idaro,
- la malrespektado de la tradicio ŝanĝiĝis je transformita venko de la sana racio,
- kaj la likvido de la pozitivaj valoroj ŝanĝiĝis je senigo de la antaŭjuĝoj, ni troviĝas en la konata medio de la meza Eŭropo. Al tio mi aldonas, ke:
- la libereco sin altigis je arbitro de la unuopulo,
- la tolereco ŝanĝiĝis kiel cedo por malbono,
- kaj la korekteco ŝanĝiĝis je deviga opinia koridoro.

[1] *Kiel „ĉefaj“ tiuj ĉi pekoj ne estas konsiderataj tial, ke ili estas ĉiam nepre tiuj plej gravaj pekoj, sed ke la kristana sperto montras, ke ĝuste tiuj ĉi pekoj estigas aliajn pekojn kaj aliajn malvirtojn, kaj se ili mem ne estas tiuj plej malbonaj, al tio plej malbona ili fine kondukas – ili estas certaj radikoj, el kiuj pluaj pekoj kaj malvirtecoj sinsekve „elkreskas“ – komparu, kion diras la katolika katekismo pri la ĉefaj pekoj.* ■

*Prof. PaedDr. ThDr. MUDr. et MUDr. Jaroslav Maxmilián Kašparů, Ph.D., dr. h. c.*
*Transprenita el revuo „Milujte se - Amu vin“ 2018-47*

Mezaĝa sinjorino, kiu ĉiam mensogas pri sia aĝo, vizitas la kuraciston pro diversaj plendoj. Post la ekzameno li diras:
– Via hepato estas ŝvelinta, via stomako iom delokiĝis kaj ankaŭ vi suferas pro reŭmatismo.... Kiom da jaroj vi havas?
– Dudek ok, doktoro – ŝi respondas, kokete ridetanta.
– Ho, estas pli grave ol mi supozis – konstatas la kuracisto, – via memorkapablo ankaŭ ne bone funkcias!

## ABC CIVILIZACIO DE LA AMO
### Kardinalo Stefan Wyszyński



1. Estimu ĉiun homon, ĉar en li vivas Kristo. Estu perceptema rilate al ĉiu – ĉar tiu estas via frato aŭ fratino.
2. Pri ĉiu bone opiniu – pri neniu opiniu malbone. Eĉ en la plej malbona homo provu trovi ion bonan.
3. Pri aliuloj ĉiam parolu bone – pri la proksimuloj parolu neniam malbone. Reĝustigu maljustaĵon kaŭzitan per la vortoj. Ne estu kaŭzo de la konfliktoj inter homoj.
4. Kun ĉiu parolu per la lingvo de la amo. Ne fortigu voĉon. Ne malbenu. Ne kaŭzadu problemojn. Ne kaŭzadu ploron. Trankviligu kaj esprimu bonon.
5. Pardonu al ĉiuj kaj ĉion. Ne kaŝu en la koro koleron. Ĉiam prezentu la manon por repacigo kiel unua.
6. Faru bonon ĉiam al la proksimulo. Al ĉiu faru bonon tiel, kiel vi volas, ke la aliaj faru al vi. Ne pripensu tion, kion iu devas fari por vi, sed pripensu tion, kion vi devas fari por aliulo.
7. Aktive helpadu al suferulo. Volonte kontribuu per konsolo, konsilo, helpo, koro.
8. Laboru honeste, ĉar la fruktojn de via laboro uzas aliuloj, kiel ankaŭ vi uzadas fruktojn de ilia laboro.
9. Partoprenu la vivon de la socio. Malfermu vin por malriĉuloj kaj malsanuloj. Dividu kun aliuloj materiajn kaj spiritajn bonojn. Strebu vidi bezonulojn ĉirkaŭ vi.
10. Preĝu por ĉiuj, ja eĉ por viaj malamikoj. ■

*(El revuo „Milujte se - Amu vin“ 2020-52)*

## KIAL MI DEVUS VIZITADI PREĜEJON?

Unu bona kaj tre fervora katoliko sendis al ĉefredaktoro de certa gazeto leteron, en kiu li plendis, ke li ne plu volas vizitadi ĉiudimanĉe preĝejon. „Mi vizitadis preĝejon tridek jarojn,“ li skribis, „kaj dum tiu tempo mi aŭskultis eble tri mil predikojn. Mi certigas vin, ke eĉ ne unu mi memoras. Tial mi opinias, ke mi perdas tempon kaj ke ĝin perdas ankaŭ pastroj, kiam ili predikas.

Post publikigo de la letero ekiĝis en la gazeta rubriko „Leteroj al ĉefredaktoro“ vigla diskuto. Multaj homoj agnoskis pravon de la skribinto. La debato daŭris longajn semajnojn, ĝis kiam iu skribis: „Mi estas edziĝita jam tridek jarojn. Dum tiu longa tempo al mi mia edzino preparis tridek du mil manĝojn kaj mi estas konvinkita, ke mi memoras eĉ ne unu menuon. Sed mi scias ĉi tion: ĉiu manĝo vivtenis kaj fortigadis min, por ke mi povu realigi mian laboron. Se ilin mia edzino al mi ne preparadus, hodiaŭ mi ne plu vivus. Kaj se mi ne venadus satigi min en la preĝejon, mi jam antaŭlonge estus morta spirite.“ Se Dio havus fridujon, Li havus sur ĝi vian fotografaĵon. Se Li havus Fejsbukon, certe Li ankaŭ ĝin tie havus. Ĉiumatene li sendas al vi florojn kaj ĉiumatene tagiĝon. Ĉiam, kiam vi volas kun Li paroli, Li do aŭskultas vin. Li povas loĝi kie ajn en kosmo, sed Li elektis vian koron. Serĉu Lin! Dio estas enamiĝinta je vi. Dio ne promesis tagojn sen suferoj, ridetojn sen afliktoj, sunon sen pluvo. ■

(El la libro de Bruno Ferrero „Balzamo por animo“)

## MIA „PATRO NIA”

Francsics Józsefné (Hungario)

Kiam via koro jam triste troplenas,
Kiam vin viziti jam nenio venas,
Kiam vian vivon nigra nubo kovras,
Kiam la amatoj pri vi ne plu zorgas,
Ho „animo”, neniel malesperu,
Supren rigardu, obstine esperu,
Preĝante: * PATRO NIA, KIU ESTAS
EN LA ĈIELO,*

Kiam vi sentas vin sola en la mondo,
Al demandoj viaj ne venas respondo,
Kiam ĉirkaŭas vin aĉa vort-inundo,
Blasfemas la Malbon' Dion kiel hundo,
Ho „animo”, ne lasu vin trompi,
Supren rigardu, por la sorĉon rompi:
Sinjor', *SANKTIGATA ESTU VIA
NOMO.*

Kiam la Malbono regas jam la Teron,
Kaj la mensogaro subpremas la Veron,
Kiam eĉ tutglobe estiĝas Infero,
Kaj la homojn signas Kaina fajra fero,
Ho „animo”, ne laciĝu, ne kapitulaciu;
Supren rigardu, al lumo eterna,
Kaj petu: Sinjor', *VENU VIA REGNO.*

Kiam vin turmentas la morna realo,
Kiam malaperas ĉiu idealo,
Kiam vi suferas pro nervoza febro,
Kiam amikeco iĝas nur funebro,
Ho „animo”, ne kolapsu, ne amariĝu!
Supren rigardu, al la nub-tavolo,
Kaj diru: Sinjor'! *FARIĜU VIA VOLO
KIEL EN LA ĈIELO, TIEL ANKAŬ
SUR LA TERO.*

Kiam malriĉuloj ŝparadas monerojn,
Kiam vi konstatas altiĝi la prezojn,
Kiam la riĉuloj havas milionon,
Dum la malriĉuloj eĉ ne la milonon,
Ho „animo”, gardu la koran kuraĝon,
Supren rigardu, preĝ-movu la manon,
Kaj petu: Sinjor' *NIAN PANON
ĈIUTAGAN DONU AL NI HODIAŬ*

Kiam pri la vivo vi jam tro-laciĝas,
Kiam via kredo jam forvaporiĝas,
Kiam preĝi mankas kaj emo kaj forto,
Kiam Lin nei altrudiĝas vorto,
Ho „anim”, vin gardu! Nepre ne konsentu!
Supren rigardu, al Dio vin donu:
Sinjor', helpu! *KAJ PARDONU AL NI
NIAJN ŜULDOJN,*

Kiam vi kredis esti estimota,
Kaj ankaŭ loĝejo estis ricevota,
Ĉiu via tasko estis plenumita,
Sed nun vi jam scias esti fi-uzita,
Ho „animo”! Ne koleru, ne malfidu:
Supren rigardu, al Dio vi konfidu:
Sinjor'! *KIEL ANKAŬ NI PARDONAS
AL NIAJ ŜULDANTOJ.*

Kiam grandpotencoj pri paco parolas,
Sed fakte - mortigi, pereigi volas,
Kiam ili ĉion klopodas konkeri ,
Kiel tion, Patro, vi povas toleri?!
Ho „animo”! ne ribelu, ne frustriĝu;
Supren rigardu, kaj faru atenton:
Sinjor'! *KAJ NE KONDUKU NIN EN
TENTON, SED LIBERIGU NIN DE LA
MALBONO, AMEN!*

EPILOGO

*

Kaj tiam ekparolas la Majstro, severe sed
milde:
“For, Satano! Ĉesu ĉiu vento!
Estu PACO kaj SILENTO!”

*

Kial vi timas, etfiduloj?
FIDU! Ja mi promesis al vi,
Ke la infero ne povas vin venki!
Ho, fidela grego, jen mi, la Pastoro,
Kiu restos kun vi, ĝis la lasta horo!

*Tradukis el la hungara Prof. E. Dudich*

# TIO ESTAS MI, NE TIMU (Mat 14,27)
## Eŭkaristia medito de beata Conchita Armida

Jesuo, kiu ordonas al ventoj kaj ili obeas, eliras renkonten al tiuj, kiuj havas malgrandan kredon kaj estas timemaj, por doni al ili kuraĝon, por ke ili havu en Li grandan fidon.

Kuraĝon, ne timu, tio estas Mi, mi diris al miaj disĉiploj, kiuj el rigardo je mi ektimiĝis, kiam mi al ili dum sunleviĝo proksimiĝis kaj paŝis sur la maro. Per tiuj ĉi kuraĝigaj vortoj mi hodiaŭ en Eŭkaristio turnas min al vi.

Mi estas... Se vi havas min ĉe via flanko, kio vin timigus? Mi estas Dio de la paco, kiu sopiras vin savi, Dio de la pardono, kiu vin amas per senlima amo. Jam antaŭ aŭroro de ĉiuj tempoj mi vin amis, Mi estas Dio, kiu ne volas morton de la pekulo, sed ke li deturnu sin de sia konduto kaj vivu[1].

Mi estas Jesuo kaŝita en Eŭkaristio, mi estas tiu, kiu faras miraklojn de sia ĉiopotenceco, tiu, kiu estas ĉi tie kun sopiro por enpreni en sian posedon tutan vian estaĵon.

Tial aŭdu per aŭdpovo de via animo la voĉon, kiu al vi diras: Ne timu, ĵetu vin en la maron de la doloroj senhezite, ĉar se vi havas kredon, mi mem estos via apogo.

Mi amas vin kaj iras al vi ĝuste tial, ĉar vi vane batalas kontraŭ ventego de viaj pasioj, se mi ne estas ĉe vi.

Mi estas tiu, kiu ordonas al la maro, silentigas la ŝtormojn same kiel mi silentigas ŝtormojn en la animoj de tiuj, kiuj alvenas, por min serĉi, kiuj plenaperte malfermas pordegojn, kiuj estas miaj.

Ne timu, ne timu, Mi estas aminda Jesuo.

Fidu kaj sentime ĵetu vin en brakumon de mia Patrino, sur tiun altaron, el kiu vin miaj okuloj serĉas en la homamaso. Venu, venu, tio estas Mi, tio estas Mi.

### *Danko*

Mia bona Jesuo, kiel Petro mi eniras la akvon por sentime iri al Vi, kiam mi aŭdas... Venu![2]. Tiel ankaŭ mi iras al Vi kun la sama entuziasmo kaj per ĉiuj fortoj de mia estaĵo kun certeco, ke mi ne droniĝos, se mi havas la kredon.

Sinjoro, se tio estas Vi, ordonu min veni al Vi[3], kaptu min, se mi denove komencos droniĝi en profunda maro de mia mizereco. Certe mi ne povas veni al Vi sen Vi, sed etendu vian manon kaj ekkaptu min, kiel Vi tion faris al Petro, fortigu mian kredon je via potenco kaj je via protekto.

Mia Jesuo, mi amas Vin kaj mi ne timas, ĉar Vi pardonas multon al tiu, kiu vin multe amas[4]. Kreu en mi puran koron[5].

Vi estas mia forto. Konduku min, mia Jesuo, kaj larĝe malfermu mian estaĵon, por ke ĝi kapablu akcepti multobligon de Dia vivo.

Jesuo, multobligu mian kredon kaj donu, ke kresku ankaŭ mia kredo, kiu plifaciligas vojon de la Kruco, kiu la devon transformas je ĝojo, kio estas privilegio de Diaj infanoj. Mi metas mian timon en vian mizerikordon, ĉar neniu, kiu fidas, estos damnita[6].

Patrino bonvolema, Vi scias, ke mi estas malforta kaj mi mem kapablas fari nenion. Tial Li venis kaj diris al mi, ke mi ne timu. Petu Lin, ke Li min benu, kaj helpu al mi, ke mi plenumu lian volon.

### *Ideo por la vivo*

Mi konservos tiun ĉi belan principon: bone fari tion, kion mi faras, ĉar la hodiaŭa tago estas tio, kion Dio de mi postulas. Sentime antaŭ problemoj, kun pureco de la celado, volonte kaj ĝoje.

### *Antaŭintenco*


Hodiaŭ Vi min vokas kaj mi ne timas, Jesuo; Vi diras al mi, ke tio estas Vi, kaj mi ne hezitos, spite de kiu ajn aflikto, en certeco, ke Vi estas kun mi.

Jesuo, mi dediĉas al Vi hodiaŭ ekzercon en iu virto por prospero de la Eklezio. ■

[1] kmp. Jeĥ 18,23
[2] kmp. Mat 14,29
[3] kmp. Mat 14,28
[4] kmp. Luk 7,47
[5] kmp. Psa 51,12
[6] kmp. Psa 25,2

# KRISTO EL MORT´ LEVIĜIS

*El Ukrainio sac. Serhij Prudko kaj sac. Valentino Matijaŝ*




**Feliĉan Paskon en Kristo resurektinta!**

**Gracojn de Kristo al ĉiuj legantoj de la revuo Espero Katolika deziras estraro de IKUE kaj la redakcio.**

